

Sud-Afriko kaj la Unuiĝintaj Nacioj

Claude Gacond, 78-a radioprelego, 1964.05.27 & 30

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri Sud-Afriko kaj Unuiĝintaj Nacioj. Vi aŭdas Claude Gacond.

Eksperta komitato de Unuiĝintaj Nacioj nun kunsidas en Londono. Ĝia tasko estas ellabori planon de ekonomia blokado de la Sud-Afrika Respubliko. Ĝis hodiaŭ Unuiĝintaj Nacioj voĉdonis dudek naŭ rezoluciojn kondamnantajn la politikan reĝimon de tiu lando. Sed dek kvin nacioj principe decidiĝis por limigita blokado. Ekster ĝia ekskludo el Internacia Labor-Organizaĵo kaj el Ekonomia Afrika Komisiono, la en Nov-Jorko deciditaĵoj ne tuŝis la landon. La nura grava malagrablo, kiun ĝi renkontas, estas la malpermeso al la aviadiloj de la Sud-Afrika Aerkompanio surteriĝi en la plejmulton de la afrikaj aerodromoj.

La nuna situacio tamen ŝajnas rapide evolui : la konflikto de la Sud-Okcidenta Afrika Teritorio eniras decidigan fazon. Tiu teritorio estas malnova germana kolonio situanta nord-okcidente de Sud-Afrika Respubliko. Post la dua mond-milito ĝi estis lokumita sub la kontrolo de la Kuratora Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj. Sed ĝi estis fakte invadita kaj praktike aneksita de Sud-Afrika Respubliko en 1952. De kvar jaroj proceduro komenciĝis pri tio en Internacia Justeca Kortumo en Hago. La Kortumo devas fari sian juĝon dum tiu ĉi jaro. La ekzakta demando, kiun ĝi devas decidi, estas tia : Ĉu la rasapartigita politiko rajtas esti aplikata al la Sud-okcidenta Afrika Teritorio ? Plej verŝajne la Kortumo sin prononcos kontraŭ Sud-Afrika Respubliko kaj pravigos la argumentojn de la Kuratora Konsilantaro.

Sed kiel Unuiĝintaj Nacioj kapablos rekonigi sian rajton sur teritorio pli granda ol Francio kaj kiu estas firme subigata de moderna armeo ? Tiam ekonomia blokado eble ludos gravan rolon. Laŭ la fakulo Jean Ziegler Unuiĝintaj Nacioj havas la intencon malpermesi la eniron al la sudafrikaj havenoj al ĉiuj ajn ŝipoj. Tio estus ekonomia blokado.

La historio ne konas multajn blokadojn, kiuj devigis landon ŝanĝi sian politikan kaj socian reĝimon. Tamen la partizanoj de la blokado rimarkigas, ke Sud-Afriko nur produktas mem 7 procentojn de la uzata nafto. Blokado, se ĝi estus observata de ĉiuj UN-membroj, malplenigus la naftan rezervon en kvar monatoj.

La kontraŭloj al la blokado multas. Ili argumentas, ke la plej multo de la industriaj landoj komercas kun Sud-Afriko. Ekzemple Britujo eksportas 20 procentojn de sia fervoja produktado al tiu lando kaj 13 procentojn de siaj elektraj maŝinoj. Se subite tiu eksportado ĉeŝus 150'000 britaj salajratoj subite senlaborus. Oni do konstatas, ke kontraŭ la blokado de Sud-Afriko ekzistos gravaj kaj eble trafaj kontraŭstaroj. Oni ankaŭ pensis, ke blokado de tiu lando provokus monajn malfacilaĵojn en diversaj landoj, sed verŝajne Internacia Mona Fonduso kapablos solvi tiun aspekton de la problemo.

Verŝajne la blokado de tiu lando ne okazos. Estus ekstrema solvo post la senrezulta elprovado de multaj aliaj solvoj. Sed tiu diskutado lumigas la nunajn mankojn en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. En tiu Ĉarto troviĝas bela proklamado pri la Homaj Rajtoj, sed tiu Ĉarto ne donis al Unuiĝintaj Nacioj la eblojn devigi la subskribintojn de tiu Ĉarto al obeo.

De la jaro 1948, kiam la naciista partio prenis la povon en Sud-Afriko, la tiea registaro proklamas, ke ĝi defendos la superregon de la blankuloj per ĉiuj ajn rimedoj. Tiuj rimedoj estas gravegaj : Sud-Afriko disponas je la plej forta armeo en la afrika kontinento. En ĝi troviĝas nur blankuloj verŝajne decidataj defendi ĝis la lasta ekstremo siajn privilegiojn.

La ekzisto de tiu potenca armeo tamen ne devas al ni forgesigi, ke en tiu lando pli ol dekdu milionoj da afrikanoj kaj azianoj estas konsiderataj kiel subuloj, kiuj ne rajtas ĝui pri la plej elementaj homaj rajtoj.

Maljusteco neniam povas eterniĝi. Sed tamen dum ĝi daŭras centmiloj kaj centmiloj da homoj suferas senelirejan vivon. Reverendo Michel Scott estas unu el la personecoj, kiuj, en

Sud-Afriko kaj la Unuiĝintaj Nacioj
Claude Gacond, 78-a radioprelego, 1964.05.27 & 30

la internaciaj medioj, plej multe defendis la rajtojn de la nigruloj en Sud-Afriko kaj Sud-Okcidenta Afriko. Li plenumas malfacilan taskon, kiel observanto de Internacia Ligo por la Homaj Rajtoj. Ofte oni komparas lin al Mahatmo Gandhi aŭ Albert Schweizer.

Se Mahatmo Gandhi, antaŭ ol fariĝi la apostolo de Hindio, unue konsciis pri la suferoj de la malplimultoj en Natalo, en Sud-Afriko, estas en Hindio, ke la misio de Michel Scott komenciĝis. Dum longaj jaroj li vivis en Bombajo. Post vundiĝo en 1943 li migris al Sud-Afriko por labori en leprulejo. Tie li tuj helpis la kolorulojn, kiuj reprezentas la naŭ dekonojn de la loĝantaro, sed rajtas mizere vivi nur sur 13 procentoj de la landa areo. Neniun rimedon por defendo ili posedas kaj ĉiuj leĝoj celas pli kaj pli neniigi ilian nacian kaj civitanan konsciencon. Ili laboras kiel sklavoj en oraj kaj diamantaj minejoj, en farmoj aŭ en uzinoj kaj iliaj gajnoj ne permesas al ili akiri materialan sendependecon, eĉ post longegaj laborjaroj.

Michel Scott ne povis resti longe en Sud-Afriko. En 1951 la sud-afrika registaro jam reprenis al li la sud-afrikan civitanecon, kiun li estis akirinta tuj post sia alveno.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond prezentis la konflikton inter Sud-Afriko kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-